**HIROŜIMA-o kaj NAGASAKI-o, la plej gravaj terorismaj agoj en homara historio.**
Verkita de *Éric Bernard COFFINET* la 7an de aŭgusto 2025

Terorismo estas terurigi civilulojn por plenumi politikan celon.
Kio estas laŭ via opinio la plej grava ago terorisma en la 100 lastaj jaroj?
Ĉu la 11a de septembro 2001 en Nov-Yorko (3000 mortintoj)?
Ĉu la 7a de oktobro 2023 en Israelo (1500 mortintoj)?

Laŭ mia opinio tio estas la uzo de atombomboj kontraŭ la japanaj urboj Hiroŝima-o kaj Nagasaki-o (200000 mortintoj en tute), kies 80ajn datrevenojn ni funebre celebras.
Tio estis nur terorismo sen iu ajn milita pravigo, ĉar Japanio estis jam plene venkita kaj serĉis nur honorigan eliron al paco...
Ĝiaj industrioj estis detruitaj kaj ĝia malsata popolo multe suferis.
Tio restanta de ĝia aerarmeo estis sin detruanta per atakoj "kamikazaj".
Ĝia mararmeo estis jam venkita de Usono kaj ĝiaj plej potencaj militŝipoj estis detruitaj.
Ĝia terarmeo estis tuj venkota de Sovetunio en norda Ĉino kaj la kapitulacio de la japana armeo de Guandong-o je la 10a de aŭgusto (ne la du atombomboj en la 6a kaj 9a de aŭgusto) estis la vera kaŭzo de la senkondiĉa kapitulacio de Japanio anoncita de la 124a imperiestro Hirohito (1901-1989) per radioelsendo je la 15a de aŭgusto 1945. La tiama militista socio japana povus postvivi eĉ milionojn da mortintoj sed tute ne plenan malvenkon de ĉiuj siaj armeoj...

Uzo de atombombo havis ne militan sed nur politikan celon: elmontri al Sovetunio (tiama aliancano sed baldaŭa malamiko...) la teruran potencon de Usono. Tion decidis la 33a usona prezidento *Harry S. TRUMAN* (1884-1972) kaj realigis la generalo *Curtis Emerson LEMAY* (1906-1990). Tiu generalo antaŭe planis la amasbombadon de la germanaj urboj en 1943-44, kaj tiu de Tokio (100000 mortintoj) per bruligaj bomboj dum la nokto 9a-10a de marto 1945. Li tiam deklaris ke "ni revenigos Japanion al la ŝton-epoko". Plene konscia pri siaj agoj li ankaŭ deklaris, ke en kazo de usona malvenko li estus juĝita kiel milit-krimulo, tamen la japana registaro honorigis lin je la 6a de decembro 1954 per la ordeno de la "leviĝanta suno" je unua rango kun granda kordono!